

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

NIAJ PLANOJ

(Se ne aparte menciite, la loko estas Kanagaŭa-Kenmin Sentaa, ĉirkaŭ la Stacidomo Jokohamo)

*La 1-a Ĝenerala kunveno de la Ne-Profitcela Organizo Esperanto Jokohama kaj ties gratula evento.

junio 20, 17h00-19h00, ĉambro 710

*Speciala konversacia klaso, kun Wajik Iwanicki
julio 25, 15h00-17h00

*Prelego de Heidi Goes

aŭgusto 30, 14h00-16h30, ĉe Tikyuu-Plaza (Tergloba Placo)

*Ekspozicio pri Internaciaj amikecaj agadoj
Sept. 5 kaj 6, en la ekspozicia halo

*La 100-a legokunsido, pri "Padma, la eta dancistino" de Tibor Sekelj

Sept. 12, 13h00-15h00, ĉambro 707

TIEL OKAZIS

HAMA-RONDA VESPERO pri la Ĝemelaj Urboj de Jokohamo

*majo 16, 17:00-18:45

9 personoj temis pri la Ĝemelaj Urboj. Inter pluraj urboj, nia rondo havis kontakton kun Liono en Francio kaj Odeso en Ukrainio. S-ino Aida Yayoi parolis pri sperto kun Liono, s-roj Tanigawa Hiroshi kaj Karibe Riichi pri sperto kun Odeso.

LA 99-A LEGOKUNSIDO

*jun. 6, 13h00-15h00

6 personoj, legintaj "Modernaj Robinzonoj" de Teodoro Schwartz, parolis pri la impresoj. Ĝi temas pri fuĝo de militkaptitoj el Ĥavarovsko en Siberio, tenataj de japanoj post la Unua Mondomilito. La historio pri tia militkaptado estis ne tre konata inter japanoj.

Letero el Nepalo

de Razen Manandhar al Doi Ĉieko

2015-05-31

Estimataj,
Saluton. Mi heraŭ nokte legis novaĵon ke okazis granda tertremo en Japanio. Mi multe pensis.

Mi hodiaŭ mateno legis ke ne okazis granda katastrofo ĉiuj bone vivas.

Nu ĵus eliras grandan katastrofon. Mi nun scias kio okazas post la tertremo - mi vidis montojn de 8500 homoj!!!!

Estu sekuraj kaj helpu unu al alia.
Kore salutas vin,

Razeno



Niaj Klasoj kaj Kursoj

*Regulaj Klasoj en sabato: (1) Klaso por legado de "Hispana, Kataluna, Mangada..." / (2) Jokohama Salono. 2 fojojn oni legas el libro: "Vizaĝoj" / (3) Rudimenta kurso de Doi Ĉieko (de apr. 25 ĝis jul. 18)

*Regulaj Klasoj en merkredo: (1) Oni legas "Rakontoj sub la lito" de Antoaneta Klobuĉar. / (2) Daŭriga kurso, per la posta parto de "Hanako lernas Esperanton".

- Eldonas Sibayama Zyun'iti ■ Redaktas Esperanto Jokohama: Sibayama Zyun'iti, Noriko
- Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
- Redaktejo: tamtamo@googlegroups.com ■ TTT-ejo: <http://www.esperanto.yokohama/>
- Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

ESEOJ



Handikapito je okuloj

Murata Kazuyo

Perturbo en vidpovo

Hieraŭ mi ĉeestis en kurso por volontuloj, kie oni gvidas voĉlegadon por blindulo. La kurso daŭras 8 fojojn, kaj la unua tago oni informis kio estas blindeco. Ankoraŭ nun mi ne bone scias pri blindeco. La gvidanto venis de centro de organizo por blinduloj nomata *Light center*, li estas denaske blinda. Li klarigis, kia estas problemo de blinduloj. En Japanio vivas ĉ. 316 mil personoj, kiuj havas handikapon je okuloj. Inter ili, veraj blinduloj troviĝas nur 10%, kaj aliaj estas nomataj vidmalfortuloj (ne sufiĉa vidkapablo). (angle low-vision, japane 弱視)

La kialoj de blindeco

Kialo	Kreskulo(310000)	Infano(4900)
malsano	*1) 20%	*2) 12%
akcidento	8%	0%
maljuniĝo	2%	0%
denaska	4.5%	12%
nekonata	66%	77%

Malsano: *1) pro diabeto (糖尿病), glaŭkomo (緑内障), 網膜色素変性症

*2) 未熟児網膜症、網膜芽細胞腫 (かん止分婉) 等

La specoj

1) disting-kapablo (視力): Kiel vi bone scias, ke troviĝas la grado de 2.0 ĝis 0.01.

2) senti lumon (光覚): Iu preskaŭ ne sentas lumon.

Iu povas distingi la movon de mano tuj antaŭ la okuloj (眼前手動と呼ぶ).

Iu ne povas distingi la nombron de fingroj tuj antaŭ la okuloj. (眼前指数と呼ぶ)

3) vasteco de videbla spaco (視野) kutime oni povas vidi vertikale 150°, horizontale 130°.

Iu ne povas vidi nur 10° el la centro. Iu nur povas vidi kiel cirklo (nomata ドーナツ視野). Tiuj personoj malfacile moviĝas por eviti kolizion.

Je mia surprizo, nur 10% da ili uzas brajlon.

Pri voĉlegado

En la unua kurso por lerni voĉlegadon al blinduloj, mi surpriziĝis sciante, ke blinduloj povas ricevi nur 20% da informoj el la tuto, kiun ĉiutage oni akceptas senkonscie. Pro tio voĉlegado estas tre grava por ili. Tiu realo estas tre ŝoka afero por mi.

Mi simple supozis, ke ni legu librojn aŭ magazinojn. Sed krome ni devas legi ĵurnalojn aŭ vortarojn, aŭ bildlibrojn eĉ mangaojn.

En ĵurnalo troviĝas ne nur artikolo sed ankaŭ mapo, foto, desegnaĵo kaj tabelo. Kiel kaj kiamaniere ni povas legi ilin? Ankoraŭ nun mi tute ne povas supoziti tion, sed de tempo al tempo ni lernu pri tio.

La plej grava afero, kiun ni devas atenti: Unue precizecon (ekzakta, ĝusta). Pro tio ni devas studi tion, kion ni ne scias kiel legi la vorton. Ekzemple la ĉinan ideogramon de propra nomo, oni prononcas diverse. 神戸 {koube, kanbe, goudo...}

Komuna prononco: La anoncisto de NHK (Japana Brodkasta Asocio) parolas per komuna prononco. En kutima legado ni devas prononci komune, ne uzu dialekton. Kiam ni legas frazojn, estas grave meti kelkan momenton por bone komprenigi aŭskultanton.

Klara prononco: Ni devas elvoĉigi vortojn uzante abdomenan spiradon, se ne, la voĉo ne bone registriĝas. Kaj nepre necese estas rekta teniĝo de korpo. Krome ni devas eviti ĉirkaŭan bruon, pro tio mi aĉetis mikrofonon por mia registrilo (Ĝi kostis 5800 enojn!!).

Ankaŭ ni devas eviti heziton, stumblon, ŝanceriĝon. (言い淀み、読み淀み) Por tio ni devas bone kompreni la enhavon kaj kelkfoje ekzerci legadon.

La gvidanto diris, ke per nur 6-foja kurso ni ne povas ellerni la voĉlegadon. Ŝi daŭrigas la agadon jam 20 jarojn sed ankoraŭ ne estas sufiĉa. Aŭdinte tion mi perdis memfidon, ĉu mi povas daŭrigi la lernadon...



Hortensioj en Marparadizo



Mizro Iwaya

Hortensioj ekfloras en junio. Ni vidas ĝian floron en diversaj lokoj de la urbo. Se temas pri Jokohamo, oni trovas multe en Marparadizo: amuza parko ĉe la suda marbordo, kies japana nomo estas 八景島シーパラダイス. Mi vizitas ĝin ĉiujare kiam ekfloras hortensioj.

Ĉijare mi vizitis ĝin en la 10a de junio kun mia edzino. La vetero estis bona kaj ni biciklis ĉirkaŭ unu kilometron al ĝi. Survoje troviĝas alia amuzejo nomata Mara Parko, 海の公園. Ankoraŭ tro fruis en la sezono de la maro kaj troviĝis nur dekoj da vizitantoj tie. Trans tiu parko ni atingis la celatan Marparadizon. Post la sukceso de Tokia Diznejlando en Urayasu, oni konstruis multe da t.n. temaj parkoj en Japanio, sed bedaŭrinde multaj el ili ne sukcesis en komerca servo kaj estis fermitaj post certaj jaroj. Feliĉe tiu Marparadizo apartenas al aliaj esceptoj, kiuj daŭrigas sian funkcion ankoraŭ nun post ĉirkaŭ 20 jaroj de la malfermo. Precipe dankinde estas al ni, ke ni povas eniri ĝin senpage. La administranto laŭeble reduktis ĝian funkciigan koston kaj ĝi tenas sin nur per la profito de amuzaj provizaĵoj, diversaj vendejoj kaj manĝejoj/trinkejoj.

La hortensioj ankoraŭ ne estis plenfloraj. Ili estis ĉirkaŭ duonfloraj sed estis sufiĉe por ni pri la promenado en la parko. Ni scias ke ekzistas

multaj specoj en la familio de hortensio. Ankaŭ ĉi tie ni vidas kelkajn variaĵojn. Precipe rimarkinda estas tiu de ノリウツギ, *Hydrangea paniculata*, ĉar ĝia parenco nomata ミナヅキ vivas antaŭ la enirejo de Esperanto-Domo de Jacugatake.

Aparte de hortensioj troviĝas ankaŭ birdoj kiel fenikopteroj kaj pelikanoj apud la lageto. En la maro apud la kajo troviĝas ankaŭ delfenoj. Ni promenis en la parko spektante ilin kiel kutime.

Kiam ni sidis ĉe la tablo dum la promenado, ni vidis multe da paseroj, kiuj estas tute intimaj al homoj kaj bekumas disŝutitajn kukerojn eĉ sur la tablo.

Tiamaniere pasis unu tago en la sezono inter printempo kaj somero.



VASILIJ EROŜENKO – JAPANA POETO (7)

Tatyana Auderskaya (Ukrainio), verkita en 2012

En 1929 Vasilij Eroŝenko veturas al Ĉukotka^{*1}. La ekstera preteksto estis viziti sian fraton-veterinaron, esplori la vivon de blinduloj. Sed reale Eroŝenko, kiel ĉiam, serĉas homon. En tiu tempo moskvanoj vivis streĉite; kiel diris rusa verkisto M. A. Bulgakov, “la problemo pri apartamentoj fuŝigis ilin”. Do, same kiel en Ĉinio, Eroŝenko sentas sin nebezonata al burokratisma maŝino de la grandega lando. “Ju pli multe ŝvelas urboj-gigantoj,” - skribis Eroŝenko en la eldonitaj en

30-aj jaroj skizoj “El vivo de ĉukĉoj^{*2}”, - “des pli malgranda iĝas en ili homo. Kaj finfine li reduktiĝas ĝis tiel ordinara stato, ke lia vivo kaj morto jam interesas nenium. Ĉio estas alimaniere en arkta tundro. Ĉukĉoj scias aprezi homon”.

Kaj ankoraŭ unu, speciale interesa por ni rimarko: eĉ tiam, antaŭ preskaŭ jarcento, kiam ne ekzistis eĉ la vorto “ekologio”, Eroŝenko jam estis konvinkita, ke ĉiu homo devas vivi harmonie kun la naturo kaj fari ion utilan por

ĝia pliriĉigo.

Sed ĉu tio ĉi estas stranga? Ĉu ekologia mondpercepto ne estas natura por normala homo, kiu sentas sin parto de la naturo? Ja ĝuste el naturo prenas siajn fortojn forta animo; la sentaŭgulo elsuĉas ilin el la aliaj homoj. Kaj eble, ĝuste tial nun kunfluigas kaj koincidas la ekologia kaj esperanta movadoj, ĉar ambaŭ ili havas la saman celon: spiritan resaniĝon de la homaro.

Tamen, ankaŭ sur Ĉukotko, kiu tiam transiris de primitiva socio al socialismo, ne trovis Eroŝenko “harmonion kun la vivo”. “Jen blinda fiŝisto ne havas esperon resaniĝi, nek labori (sed Ĉukotko ne estas Birmo, tie troviĝas nek lernejoj por blinduloj, nek minimuma zorgo pri ili). Jen juna ĉukĉo, blindiĝinte pro eksplodo de bombo (frukto de civilizacio), sin mortigis sen espero trovi sian lokon en la vivo. Ĉiam malfermita al homoj animo de Vasilij Eroŝenko reeĥis al ilia doloro kaj doloris kune kun ili. Kaj kiom da doloro, sia propra kaj de la aliaj, eltenis li dum la tuta sia vivo!

Sed li ne rezignis. Ankaŭ en la nordo li sentis sin same libere, kiel en la sudo: en Japanio, Birmo... Vintre li veturis en tundro sur boacoj, somere ĉasis anasojn laŭsone. Li kuracis homojn, dank’ al tio, ke siatempe li studis masaĝon kaj orientan kuracarton kaj havis kun si medikamentojn. Unufoje li preskaŭ frostmortis en la tundro, veturinte sola al malsanulo. Liaj veturhundoj savis lin, portinte lin preskaŭ senkonscian al vilaĝo. Kaj tie, en la tundro, frostmortante sub neĝamaso, Eroŝenko solvadis parkere la ŝakan trimovan problemon, kiun li antaŭe sensukcese provadis solvi. Li solvis ĝin tie, sur la rando de vivo kaj morto, kaj poste li rakontis pri tiu solvo en sia novelo “Trimova ŝakproblemo”: “La vivo de ĉiu homo similas al trimova ŝakproblemo. La unua movo estas naskiĝo; la dua – juneco kaj matureco; la tria – morto. Kaj jen, neniam, kiel ajn malfacila estas la situacio, neniam hastu fari la trian movon. El ĉiu pozicio eblas trovi eliron”.

Jen estas kredo de vere forta homo

Liaj japanaj amikoj, delonge ne ricevante sciigon pri li, estis devigitaj kredi, ke li mortis, pereis, ke lin “superŝutis la ĉukotka neĝblovado”. Ja malfacile estis tiam korespondi kun Japanio. Sed Eroŝenko tamen trovis eblecon sendi al amikoj “vivsignalojn”: liaj verkoj estis publikigataj en esperanta presoj kaj legataj en la tuta mondo.

Kaj Eroŝenko mem, perdinte la eblecon vojaĝi eksterlanden, komencis vojaĝojn tra la grandega Sovetunio. En la sveda Esperantorevuo aperis liaj artikoloj “Ĉe blinduloj de Uzbekistano”, “Soveta Armenio”, “El la vivo de ĉukĉoj”. Kaj en 1933 Vasilij Eroŝenko veturas al Parizo, al la vica Universala Kongreso, kaj denove li mergiĝas en tiun vivigan atmosferon de niaj kunvenoj. La simbola koloro de Esperanto estas verda, la koloro de espero. Sed tio estas ankaŭ la koloro de la vivo! La Esperanta mondo kaj Japanio subtenis la vivon de Eroŝenko, donante al li ĉion la plej bonan, la plej valoran por li: eblecon apliki siajn spiritajn fortojn, la subtenon kaj komprenon.

Sed en lia ĉiutaga vivo – 2 jaroj da instruado en porblindula lernejo en Ponetajevo, apud Niĵnij Novgorod. Ekde 1932 Vasilij Eroŝenko – korektisto en la brajla tipografio en Moskvo.

Tamen jam en 1934 Eroŝenko veturas al **Aŝĥabad, kaj poste al Kuŝka**^{*3}, la plej suda loĝloko de USSR, por labori tie kiel direktoro de porblindula lernejo. Tie li instruis literaturon, matematikon, historion, lingvojn rusan, Esperanton, anglan, turkmenan, kiun li ellernis dum duonjaro. Eroŝenko kreis brajlan alfabeton por turkmenoj, kaj baldaŭ oni jam eldonadis librojn, uzante ĝin. Same kiel iam en Birma, li alkiutimigis infanojn al memstareco, instruis ilin plenumi diversajn ĉiutagajn laborojn, priservi sin, sportumi, naĝi. Li diris: “Blindulo ne bezonas kondukiston. Lia kondukisto estas la suno”.

Kaj kiel ĉiam, li gvidis siajn lernantojn dum multaj ekskursoj tra la lando. Li invitis al Kuŝka siajn amikojn, geedzojn-muzikistojn, kaj tie komenciĝis instruado de muziko kaj kantado. Foje, kiel donaco al siaj amikoj-infanoj de ukrainiaj elmigrintoj el najbara vilaĝo Morgunovka, la blindaj turkmenaj infanoj surscenigis en ukrainia lingvo porinfanan operon “Koza-dereza” de ukrainia komponisto **M. V. Lisenko**^{*4}.
(*daŭrigota*)

*1 チュコト半島 (チュクチ半島ともいう)。シベリア最東で、ベーリング海峡に面する、ツンドラ地帯。

*2 チュクチ人。チュコト半島にすむ民族。

*3 当時のソ連邦内のトルクメン共和国 (現在のトルクメニスタン) の町。アシガバートは首都、クシュカは北部の町。

*4 ミコラ・V・リセンコ (1842-1912) はウクライナの作曲家。